

Espero Katolika



Tri milionoj kun la Papo en Copacabana, por la MJT

Numero 10-12/2013

Oktobro-Decembro 2013



JARKOLEKTO 110 - N. 1107-1109 - Oktobro/Decembro 2013
Finpresita la 15.01.14 — Finito di stampare il 15.01.14

Sur la kovrilo: *La strando de Copacabana en Rio-de-Ĵaneĵro vidita kiel oni neniam vidis ĝin: 3.000.000 kun Papo Francisko por la Monda Junulara Tago 2013 (v. p. 63).*

ENHAVO

“NE EKZISTAS VIVKRUCO, EN KIU JESUO KRISTO NE PARTOPRENUS KUN NI”	
Prediko de la Papo en Rio-de-Ĵaneĵro, por la Monda Junulara Tago	63
“NI LASU, KE NIA KORO KORTUŜIGU PER LA TENERECO DE DIO!”	
Mesaĝo de la Papo por Kristnasko 2013	65
Esperantistoj en Placo sankta Petro	65
SANKTA FAŬSTINA KOWALSKA	66
RADIO MARYJA EN POLLANDO	71
KIA ESTU BONA LITURGIO? KIEL ONI PLEJ BONE GLORAS DION?	
Prelego pri liturgio dum la KELI-kongreso 2012 – Dua parto	
Ĉu liturgio prefere estu kvietiga, profundiga, aŭ ĉu ĝi estu gaja kaj viviga, eble eĉ ekscita?	74
KONKLUDO DE LA JARO DE LA KREDO	78
NIA SINJORINO DE LA ESPERO	
De 100 jaroj Patronino de la katolikaj esperantistoj	79
MESOJ	79
FUNE BRE	80

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.
INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

NE EKZISTAS VIVKRUCO, EN KIU JESUO KRISTO NE PARTOPRENUS KUN NI

Prediko de la Sankta Patro Francisko post la krucovoja preĝado
sur la strando Copacabana en Rio-de-Janeiro, la 26-an de Julio 2013

Karaj gejunuloj! Hodiaŭ ni venis por akompani Jesuon sur lia vojo de doloro kaj amo, sur krucovojo, kiu estas unu el la gravaj momentoj de la Mondaj Tagoj de la Junu-



laro. Fine de la jubilea jaro 1984 la beata papo Johano Paŭlo la 2-a decidis doni al vi, junaj, la krucon kun la vortoj: “Portu ĝin en la mondon kiel signon de la amo de Jesuo al la homaro kaj anoncadi al ĉiuj, ke nur en Kristo mortinta kaj resurektinta estas savo kaj elaĉeto”. Ekde tiu momento tiu ĉi kruco migris tra ĉiuj kontinentoj kaj trairis la plej diversajn lokojn de la homa ekzisto, tial ĝi estas preskaŭ saturita per vivsituaĵoj de multaj junaj homoj, kiuj ĝin vidis kaj portis. Neniu povas la krucon de Jesuo tuŝi sen postlasi en ĝi ion de si mem kaj samtempe ne porti ion de la kruco de Jesuo en sian propran vivon. Mi volas, ke tiun ĉi vesperon, kiam ni akompanas nian Sinjoron, eksonu en viaj koroj tri demandoj: Kion vi, karaj gejunuloj el Brazilo, postlasis sur la Kruco dum tiuj du jaroj, kiam ĝi migris tra via vasta lando? Kaj kion postlasis la Kruco de Jesuo en ĉiu el vi? Kaj fine, kiam konon donas tiu ĉi Kruco por la vivo de ĉiu el ni?

La malnova tradicio de la roma Eklezio rakontas pri la apostolo Petro: dum la Nerona persekutado de la kristanoj li kuris for el la urbo. Survoje li renkontis Jesuon, kiu venis renkonte al li kaj tial li surprizite de-

mandis: “Sinjoro, kien Vi iras?”. Jesuo al li respondis: “Mi iras al Romo, por ke mi estu denove krucumita”. Tiumomente Petro ekkomprenis, ke li akompanu la Sinjoron kuraĝe ĝis la ekstremo, sed precipe li ekkomprenis, ke sur tiu ĉi vojo li neniam estos sola. Estis kun li konstante tiu Jesuo, kiu lin amis ĝis la surkruca morto. Jes, Jesuo kun sia kruco paŝas sur niaj vojoj kaj surprenas sur sin niajn timzorgojn, niajn problemojn, niajn timojn, eĉ tiujn plej profundajn. En sia kruco Jesuo unuiĝas kun la silento de ĉiuj viktimoj de perforto, kiuj ne povas krei, precipe kun tiuj, kiuj estas senkulpaj kaj kiujn neniu defendas. Per sia kruco



Jesuo unuiĝas kun la familioj, kiuj travivas malfacilajn momentojn, kiuj priploras la tragikan perdon de siaj infanoj, kiel la 242 junaj viktimoj de la brul-katastrofo en urbo Santa Maria komence de la nuna jaro. Ni preĝu por ili. En la kruco Jesuo unuiĝas kun ĉiuj homoj, kiuj suferas pro malsato en la mondo, kiu aliflanke permesas al si la lukson ĉiutage forĵeti tunojn da manĝaĵoj. Per sia kruco Jesuo kuniĝis kun la multaj patroj kaj patrinoj, kiuj suferas, kiam iliaj infanoj iĝas viktimoj de falsaj paradizoj, la drogoj; en sia kruco Jesuo kuniĝas kun tiuj, kiuj estas persekutataj pro religia konvinko, pro sia opinio aŭ simple pro sia haŭtkoloro. En sia kruco Jesuo kuniĝas kun ĉiuj gejunuloj, kiuj perdis bonfidon al politikaj

institucioj, ĉar ili vidas ilian egoismon kaj koruptemon, aŭ perdis fidon rilate la Eklezion, ja eĉ kredon je Dio pro la malharmonio de la vivo de kristanoj kaj servantoj



de la Evangelio. Jesuo tiom suferas pro nia malkohereco! Sur la kruco de Kristo kuŝas la sufero, la homa peko, ankaŭ nia peko, kaj Jesuo akceptas ĉi-ĉion kun malfermitaj brakoj, Li portas sur siaj ŝultroj niajn krucojn kaj diras al ni: “Kuraĝon! Vian krucon vi ne portas sola! Mi ĝin portas kun vi. Mi venkis la morton kaj tial mi venis, por doni al vi esperon kaj vivon”. (kp Joh 3,16).

Nun ni povas respondi al la dua demando: Kion postlasis la kruco de Jesuo en tiuj el vi, kiuj ĝin vidis kaj ĝin tuŝis? Kion la kruco postlasas en ĉiu el ni? Ĝi postlasas bonon, kiun povas doni neniu alia: certecon de la fidela amo de Dio al ni. Tiom grandan amon, kiu kapablas eniri nian pekon kaj pardoni ĝin, eniri nian suferon kaj doni al ni la forton ĝin porti, eniri nian morton kaj venki kontraŭ ĝi kaj doni al ni la savon. En la kruco de Kristo troviĝas la tuta amo de Dio, lia senlima mizerikordo. Kaj tio estas la amo, al kiu ni povas fidi, kaj je kiu ni povas kredi.

Karaj gejunuloj, ni fidu al Kristo kaj ni konfidu nin al Li, ĉar Li neniam iun trompos! Nur en Kristo, kiu mortis kaj resurektis, ni trovas nian savon kaj elaĉeton. Kun Li malbono, sufero kaj morto ne havas la lastan vorton, ĉar Li donas esperon kaj vivon. El la kruco, ilo de la malamo, fiasko kaj morto, Li fariĝis signo de amo, venko kaj vivo.

La unua nomo de Brazilo estis “Lando de la Sankta Kruco”. La kruco de Kristo ĉi tie antaŭ kvincent jaroj estis starigita ne nur sur la strando, kie albordeĝis ĝiaj esplorvojaĝistoj, sed ankaŭ en la historio, en la koro kaj la vivo de la brazila nacio kaj de multaj pliaj nacioj. La suferantan Kriston ni sentas proksime kiel unu el ni, kiu kuniras nian vivovoĵon ĝis ekstremo. Ne ekzistas vivokruco, granda aŭ malgranda, kiun la Sinjoro ne kunportus kun ni.

Sed la kruco de Kristo ankaŭ alvokas al tio, ke ni lasu nin infektigi per tiu amo. Ĝi instruas al ni, ke ni rigardu ĉiam la aliulojn kun mizerikordo kaj amo, precipe tiujn, kiuj suferas, kiuj bezonas helpon, kiuj atendas almenaŭ unu vorton, unu homan geston. La kruco instruas nin eliradi el ni mem, iri renkonten al la aliuloj kaj doni al ili la manon. Kiom da vizaĝoj ni vidis sur la krucvojo, kiom da vizaĝoj akompanis Jesuon sur lia vojo al Kalvario: Pilato, Simono Kirenano, la Virgulino Maria, la jerusalemaj virinoj... Hodiaŭ mi demandas al vi: al kiu el ili vi volas simili? Ĉu vi volas esti kiel Pilato, kiu ne havas kuraĝon iri kontraŭ la fluon kaj savi la vivon de Jesuo, kaj tial li super Li lavas la manojn? Ĉu vi estas unu el tiuj, kiuj lavas siajn manojn, ŝajnigante nescion kaj turnante la vidon al la mala direkto? Aŭ ĉu vi estas kiel Simono Kirenano, kiu helpis Jesuon porti la pezan krucon, aŭ kiel la Virgulino Maria kaj la virinoj, kiuj ne timis akompani Jesuon kun amo kaj tenereco ĝis la fino? Kiu vi volas esti – Pilato, Simono, aŭ Maria? Jesuo rigardas vin kaj demandas: Ĉu vi helpas al mi porti la krucon? Frato, fratino, kion vi en via forto de juneco respondos al Li?

Karaj gejunuloj, ni alportu sur la krucon de Kristo niajn ĝojojn, niajn afliktojn, niajn malsukcesojn. Ni trovos malfermitan koron, kiu nin komprenas, kiu nin pardonas, kiu amas nin kaj de ni postulas, ke ni la saman amon enportadu en nian vivon, por ke ni same amu niajn fratojn kaj fratinojn.

Laŭ Radio Vatikana



«Gloron al Dio en la altoj kaj sur la tero pacon al la homoj de lia favoro.

(...) Al tio ĉi, unue, vokas nin Kristnasko: glori Dion, ĉar Li estas bona, Li estas fidela, Li estas mizerikorda. En ĉi tiu tago mi bondeziras al ĉiuj agnoski la veran vizaĝon de Dio, la Patro, kiu donis al ni Jesuon. Mi bondeziras al ĉiuj senti, ke Dio estas proksima, resti je lia ĉeesto, ami Lin, adori Lin. Kaj ke ĉiu el ni povu glori Dion ĉefe per la vivo, per vivo elspezata pro amo al Li kaj al la gefratoj.

(...) Rigardante la Infanon en la kripo, infano de paco, ni pensu al la infanoj, kiuj estas la plej malfortaj viktimoj de militoj, sed ni pensu ankaŭ al la maljunuloj, al la mistraktataj virinoj, al la malsanuloj... La milito dispecigas kaj vundas multajn vivojn!

(...) Ho Infano de Bet-Leĥemo, tuŝu la koron de tiuj, kiuj estas implikitaj en la komercado de homaj estuloj, por ke ili konsciu pri la graveco de tia krimo kontraŭ la homaro. Turnu vian rigardon al la multaj infanoj, kiujn oni forkaptas, vundas kaj murdas dum konfliktoj, kaj al tiuj, kiujn oni transformas en soldatojn, kies infanaĝon oni priŝtelas.

Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, rigardu ĉi tiun nian planedon, kiun ofte la avido de la homoj ekspluatas laŭ sendiskriminacia maniero. Asistu kaj protektu tiujn, kiuj estas viktimoj de naturaj katastrofoj.

Karaj fratoj kaj fratinoj, en ĉi tiu mondo, en ĉi tiu homaro hodiaŭ naskiĝis la Savanto, kiu estas Kristo la Sinjoro. Ni haltu fronte al la Infano de Bet-Leĥemo. Ni lasu, ke nia koro kortuŝigu: ni ne timu tion. Ni ne timu, ke nia koro kortuŝigu! Ni bezonas, ke nia koro kortuŝigu. Ni lasu, ke ĝin varmigu la tenereco de Dio; ni bezonas liajn karesojn. La karesoj de Dio ne vundas: la karesoj de Dio donas al ni pacon kaj forton. Ni bezonas liajn karesojn. Dio estas granda en amo, al Li estu laŭdo kaj gloro eterne! Dio estas paco: ni petu al Li, ke Li helpu nin konstrui ĝin ĉiutage, en nia vivo, en niaj familioj, en niaj urboj kaj nacioj, en la tuta mondo. Ni lasu, ke la boneco de Dio kortuŝu nin».

Por la 25a fojo samkiel dum la antaŭaj benoj *Urbi et Orbi*, Kristnaske kaj Pasko, grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn, kiuj konsistigas la vorton "Esperanto". La iniciato estis gvidata de Giovanni Conti. Ĉeestis Elio Bonomolo, Laura Brazzabeni, Filomena Canzano, Patrizio Cilli, Ranieri Clerici, Giovanni Daminelli, Isabel León Fonseca, Francesco Maurelli kaj Felice Sorosina. La tutmonda televida elsendo montris ilin plurfoje.



Ankaŭ ĉi-jare ĉeestantoj volis fotiĝi fronte al la skribo Esperanto aŭ eĉ mantene unu el la literoj.

SANKTA FAŬSTINA KOWALSKA KAJ LA DIA MIZERIKORDO

*Prelego de inĝ. Jan Kalný, prezentita dum la 66-a Kongreso de IKUE
en Kalwaria Zebrzydowska, Pollando, la 14-an de Julio 2013*

Karaj gefratoj!

Mian prelegon mi komencos per demando. Ĉu vi iam aŭdis pri sanktulino Faŭstina Kowalska? Ĉu vi meditis pri la Dia mizerikordo? Morgaŭ ni vizitos interalie urbokvartalon Łagiewniki de Krakovo, kie en klostro vivis kaj mortis tiu fratulino pridonacita per aŭreolo. Pro tio estas utile konatiĝi antaŭe kun ŝia eksterordinara



vivo.

Ŝi naskiĝis la 25-an de Aŭgusto 1905, tria filino de geedzoj Kowalski, en malgranda pola vilaĝo Głogowiec (*pron. Glogovjec*), kaj ricevis baptonomon Helena. La tre malriĉa familio havos poste ankoraŭ sep infanojn, el kiuj tamen du ne ĝisvivos plenkreskan aĝon. Ĉiuj infanoj devis hejme plej baldaŭ labori kaj helpi tiel la gepatrojn nutri multnombrian familion. Tial Helenjo vizitis nur tri jarojn de baza lernejo. Kiam

ŝi estis sepjaraĝa aŭdis en ŝia animo, fronte al la elmontrita sakramento, misteran ĉielan voĉon, sed la knabino ankoraŭ ne komprenis ties sencon. Tamen ŝi daŭre pensis pri Dio kaj nokte ŝi ofte preĝis kaj ŝate legis la ununuran libron, kiun la familio Kowalski posedis: Biografioj de sanktuloj. La penigajn vivkondiĉojn de la kamparanoj pli multe komplikis la unua mondmilito. Kiam la terura konflikto finiĝis, la deksesjaraĝa knabino decidis foriri servolabori por helpi la gepatrojn kaj ankaŭ iom ŝpari monon por si mem. Ŝi laboris kiel servistino en Aleksandrów proksime de Łódź (*pron. Aleksandruv kaj Luĝ*). Tiam de tempo al tempo la junulinon vidadis nokte nekonata lumo, kiu ĉiam maltrankviligis ŝin. Malpli ol unu jaro poste, Helena revenis hejmen kaj diris al siaj gepatroj, ke ŝi volas aliĝi al monaĥinejo. Tamen la patro ne konsentis precipe pro la nebona ekonomia situacio de la familio. En tiu tempo oni postulis doton de la kandidatoj al religia vivo, sed ŝiaj gepatroj ne povis pagi. Do, ŝi trankvile respondis, ke Jesuo mem venigos ŝin tien.

La knabino forveturis do al Łódź, kie ŝi laboris loĝante ĉe parencoj kaj post unu jaro ŝi denove petis al siaj gepatroj la rajtigojn eniri monaĥinejon. Sed ili ree ne permesis al ŝi fari tiun paŝon. Seniluziigita, la juna Helena provis do vivi en Łódź iom pompe. Ŝi zorgis precipe pri sia ekstera aspekto kaj ne dediĉis atenton al voĉo de la Graco. Iam ŝi partoprenis kun sia fratino en dancamuzo. Dum danco ŝi abrupte ekvidis apud si senvestitan sangovunditan Jesuon, kiu riproĉe diris al ŝi: “Kiomlonge mi devos suferi pro vi? Kiom longe vi provokos min?”. La knabino tuj interrompis la amuziĝon kaj foriris. Kiam ŝi proksimiĝis al la katedralo, jam mateniĝis. Enirinte en ĝin ŝi vokis antaŭ la plej sankta sakramento: “Sinjoro, kion mi faru?”; kaj jen ŝi aŭdis internan voĉon: “Veturu senprokraste

al Varsovio, tie vi aliĝos al monaĥinejo”. Helena obeis. Post reveno al siaj parencoj ŝi anoncis al ili sian decidon. La onklo strebis konvinki ŝin ne postuli tion, kio certe suferigos ŝiajn gepatrojn, sed vane. La junulino estis konvinkita devi sekvi Jesuon, kiu vokis ŝin jam de infana aĝo kaj ŝi do forveturis al Varsovio.

En la nekonata medio de granda urbo Helena turnis sin al la Virgulino Maria, petante ke Ŝi gvidu ĉiujn ŝiajn pliajn paŝojn. Do ŝi iris serĉi iun monaĥinejon, kiu pretus akcepti simplan postulanton. Sed ho ve! Ĉie oni respondis ne al ŝia peto. Ŝi estis perdanta esperon, kiam en la lasta vizitita ordena domo la superulino, post aŭskulto de la dezirego de Helena Kowalska, konsilis: “Laboru almenaŭ unu jaron kaj enspezu monon por havigi al vi la necesan doton kaj poste revenu”. Surbaze de tiu rekomendo, la junulino, kiu sopiris pri profunda spirita vivo, vivis dum unu jaro en Ostrówiek (*pron. Ostruvek*) laborante tie ĉe katolika familio. En 1925 Helena faris privatan voton de ĝismorta ĉasteco kaj revenis al la monaĥinejo de la Fratulinoj de la Patrino de Dia Mizerikordo en Varsovio. Tiam la estrino diris al la postulantino: “Iru al la Dommajstro kaj demandu al Li, ĉu Li akceptas vin”. Do, ŝi iris al la kapelo por demandi tion al la Sinjoro Jesuo. Pli poste ŝi mem skribis en sia Taglibreto: “Mi tuj aŭdis voĉon: ‘Jes, mi vin akceptas, vi estas en mia koro’”.

Post la unuaj entuziasmoplenaj tagoj kaj semajnoj enviciĝis diversaj duboj. “Ĉu mi estas ĉi tie en la ĝusta loko?”. Diversaj aferoj ne plaĉis al ŝi. La kandidatino travivis malfacilajn momentojn. Dum iu vespero post preĝoj trafis ŝin profunda hezitemo: ŝi falis teren kaj ŝi petis insiste iluminiĝon pri tio, kion ŝi faru. Dum la postaj minutoj ŝian ĉelon plenigis mistera lumo kaj sur kurteno aperis la dolorplena vizaĝo de Jesuo, kies larmoj fluis sur la blankan litukon. “Sinjoro, kiu kaŭzis al Vi tian doloron?”, demandis Helena. “Vi mem, per via intenco forlasi la kongregacion. Mi ja

alvokis vin ĉi tien kaj preparis por vi multajn gracojn”. La juna provnoviculino petis pardonon al Jesuo kaj la postan matenon ŝi tuj ĉion rebonigis per konfeso. Post ioma tempo nia kandidatino malsaniĝis; pro tio la superulino sendis ŝin al filia domo en Skolimów (*pron. Skolimuv*). Tie Helena estis pridonacita per la unua mistika vizio de purgatorio. Kun la akompano de anĝelo ŝi vidis lokon kie animoj suferis en flamoj. Jesuo diris: “Mia mizerikordo tion ne volas, sed tion ordonas justeco”.

Ekde Januaro 1926 komenciĝis por Helena Kowalska periodo de novicado en Krakovo (pole Kraków, *pron. Krakuv*). En ties kvartalo Łagiewniki (*pron. Lagjevnikiki*) la kongregacio posedis grandan domon kun internulejo kaj instituto Józefów (*pron. Juzefuv*) por edukado de knabinoj. Tie oni ŝin vestis solene per la ordena vestaĵo kaj de tiu tempo ŝia nomo estis Maria Faŭstina. Dum tiu festo la noviculino svenis vidante en revelacio kiom ŝi suferos estonte. Poste ŝi laboris honeste en kuirejo, fervore preĝis, ĉiam estis gaja kaj amikema. Pasis plia jaro. En la animo de Faŭstina ekestis spirita mallumo. Al ŝi nun ŝajnis, ke Dio rifuzas ŝin, kiu ne povas legi, mediti, preĝi. Krome ŝi suferi ankaŭ korpe. La diablo sturmis. Tamen en tiu peza tempo ŝin bone komprenis kaj gvidis saĝa majstrino. Venis la tago de la sankta Vendredo 1928. Vespere en la kapelo dum la adorado Faŭstina sentis la ĉeeston de Dio: en si ŝi sentis, kiom Jesuo suferis pro ŝi. Post kelkaj tagoj sekvis eldiro de unujaraj votoj, kiujn ŝi devos reeldiri ĉiujare, dum 5 jaroj. En Oktobro samjare ŝi revenvojaĝis al Varsovio kaj de tie post ne multe al Vilnius, kiu tiutempe apartenis al Pollando. En la posta periodo ŝi ankoraŭ kelkfoje ŝanĝis restadlokojn.

Grava evento okazis en Płock (*pron. Plock*). Tie Faŭstina ricevis en sia klostra ĉelo eksterordinaran revelacion. Ŝi ekvidis Jesuon blanke vestitan, kiu havis unu manon levitan al benado kaj la duan metitan sur sia brusto. El la malfermita vestaĵo elfluis

du grandaj radioj – la unua estis ruĝa, la dua blanka. Kaj jen ŝi aŭdis voĉon: “Pentru bildon laŭ tio, kion vi vidas, kun surskribo: ‘Jesuo, mi fidas al Vi’. Mi deziras ke ĉi tiu bildo estu omaĝata antaŭ ĉio en via kapelo kaj poste en la tuta mondo”. Krome Jesuo esprimis aliajn dezirojn. Iam Jesuo diris al ŝi: “Mi promesas, ke tiu animo, kiu ĉi tiun bildon estimos, ne pereos. Mi promesas ankaŭ la venkon jam ĉi tie surtere kontraŭ la malamikoj, sed precipe gracon en la horo de morto”.

Jesuo esprimis aliajn dezirojn:

1. Mi volas, ke estu difnota festo de la Dia Mizerikordo.

2. Mi volas, ke la bildo, kiun vi pentros per peniko, estu solene konsekrota la unuan dimanĉon post Pasko.

3. Tiu dimanĉo fariĝu festo de la Mizerikordo.

4. Mi volas, ke pastroj prediku pri mia granda mizerikordo rilate al pekantaj animoj.

La Sinjoro aldonis ankoraŭ pluajn frazojn pri Sia doloro pro la malfido al Lia amo de multaj homoj.

Fratulino Faŭstina konfidis ĉion al sia superulino, kiu tamen ne plu montris al ŝi komprenemon. Ŝi volis plenumi sian taskon pentri la deziratan bildon, sed ŝi mem ne kapablis tion fari. La ĝenerala superulino, Moraczewska (*pron. Moraĉevska*), en Varsovio dubis pri la aŭtentikeco de la revelacioj. Ankaŭ aliaj fratulinoj, eĉ ŝia konfesrenanto, ne tute fidis je tiuj aferoj. Do Faŭstina ekstaris tial en vere nefacila situacio, kiu kaŭzis al ŝi multajn suferojn. Intertempe okazis novaj revelacioj, en kiuj ŝi ricevis fortigajn gracojn kaj konsolon. Post la renovigo de la ordenaj votoj ŝi denove vidis Jesuon. Li montris antaŭ ŝiaj okuloj sian mizerikordan koron, el kiu ekflamis du radioj kiel sango kaj akvo. En tiu tempo kelkaj spiritaj personoj ekkomprenis kaj akceptis ŝian mision.

La 1-an de Majo 1933 en la domo Józefów en Krakovo okazis granda solenaĵo. Fratulinoj eldiris porĉiamajn votojn. Mul-

taj parencoj kaj amikoj alveturis; nur nia Faŭstina restis sola. La patro daŭre ne estis kontenta pro la foriro de sia filino al la klos-



*Statua de Jesuo Mizerikorda
en Krakovo-Łagiewniki*

tro kaj pro tio li malpermesis al ĉiuj familianoj partopreni en la festo. Des pli arde ŝi preĝis al sia fianĉo Jesuo Kristo kaj certigis al Li sian amon. Nun ŝi naskiĝis nur por Li kaj preĝis por la venko de la Eklezio, por la Papo, la pastroj, la pekuloj kaj laŭ multaj aliaj intencoj. Por si mem ŝi petis la gracon vivi ĉiam nur por la gloro de Dio. La kvaran tagon post la vota festo aperis al ŝi Jesuo, kies korpo estis plena je cikatroj. Li diris: “Rigardu, al kiu vi fordoniĝis”. Monaton Majon fratulino Faŭstina travivis en Łagiewniki, sed poste venis ordono, ke ŝi forveturu al Vilniuso.

En la tiea monaĥinejo oni akceptis ŝin elkore. Granda estis por ŝi la surprizo, kiam ŝi renkontis en konfesprenejo unuafoje pastron, kiun ŝi konis nur el vizio. Pastro Sopoćko (*pron. Sopoćko*) ludos en ŝia plia vivo signifan rolon. Li bone ekkomprenis

la problemojn de la fratulino kaj kapablis gvidi ŝin spirite kaj praktike dum ŝia postaj vivovojoj. Ankaŭ li klarigis al la fratulino la signifon de la du elfluitaj radioj, kiujn ŝi vidis iam en la vizio. La ruĝa prezentis sangon, la blanka, akvon, kiuj elŝprucis el la interno de la Dia mizerikordo en tiu momento, kiam la mortanta koro de Kristo estis trapikita per pikstango. La pastro prognozis kelkajn estontajn eventojn. La verko de monaĥino Faŭstina Kowalska estos preskaŭ entute neniigita, sed Dio efektivigos siajn intencojn per ega forto, por pruvi ilian verecon.

Lia mizerikordo fariĝos nova gloro de la Eklezio eĉ se ĝi estas tie de ĉiam ankriginta. Dio volas, ke ĉiuj animoj ekkonu Lin kiel Reĝon de Mizerikordo antaŭ Lia alveno kiel juĝisto. La tempo de la dua alveno de la Sinjoro ne estas plu fora.

Post faka konstato pri la korpa kaj spirita stato de la monaĥino, pastro Sopoĉko mendis de la akademia pentristo Kazimierowski (*pron. Kafimjerovski*) bildon de Jesuo. Faŭstina dum la laboro direktis lin. La bildo estis preta en Junio 1934, sed ĝi ne plaĉis al la fratulino. Tamen la Sinjoro diris: “Ne en la beleco de la koloroj, nek kaj en la arto de peniko, sed en mia graco estas la grandeco de la bildo”. Komence oni pendigis la noyan artaĵon en malhela koridoro de la monaĥinejo de la franciskaninoj: pastro Sopoĉko estis rektoro de la tiea preĝejo. En la sekva antaŭpaska sankta Semajno oni ekspoziciis ĝin dum tri tagoj en Ostra Brama, konata kiel pordego de Vilniuso. Pli malfrue pastro Sopoĉko pendigis la bildon, kun la permeso de la loka ĉefepiskopo, en la preĝejo de sankta Jozefo, kie oni omaĝadas al ĝi ankoraŭ hodiaŭ.

En la paska Ĵaŭdo de 1934 fratulino Faŭstina oferis sin laŭ deziro de la Sinjoro kiel repacigan oferon por savi la pekuojn. Tio ja kaŭzis abruptajn atakojn de la diablo kontraŭ ŝia persono. Ekestis diversaj duboj, maltrankvilo: en ŝian menson trudiĝis malbenoj, blasfemoj, malespero. Kelkfoje ŝi eĉ renkontiĝis kun diabloj,

kiuj sakris, minacis, eĉ damaĝis ŝin. Al tio aldoniĝis sanproblemoj. Rentgena foto evidentiĝis tuberkolozon. Post restado en kelkaj malproksimaj ordenaj domoj la superulinoj sendis ŝin do denove al Krakovon-Łagiewniki, ĉar estis necese, ke la malsanulino havu atingeblan kuracistan fakzorgon. Pro tio ŝi restadis dum iom da tempo ankaŭ en pulmosaniga sanatorio. Tie la fratulino arde preĝis por la urĝaj bezonoj de la mondo. Ŝi havis profetecajn viziojn kaj vidis diversajn estontajn eventojn, interalie sian propran beatigan proceson. Intertempe pastro Sopoĉko en Vilniuso daŭrigis sian laboron. En 1936 li eldonis la unuan broŝuron pri la Dia Mizerikordo, surbaze de la revelacioj kaj de la Taglibro, kiujn skribis fratulino Faŭstina; li komponis litanion kaj novenon pri tiu temo. Krome li skribis ankaŭ artikolojn en katolika semajngazeto, sed nenie li menciis ŝian personon.

La restado en la monaĥinejo post la reveno ne daŭris ja longe. La korpa sufero pliakriĝis kaj al tiu doloro aldoniĝis ankoraŭ pliaj diablaj intrigoj. Denove oni devis ŝin sendi al sanatorio Prądnik (*pron. Prondnik*). La malforteco pligrandiĝis kaj pro tio la fratulino ricevis la sakramenton de la malsanuloj. Faŭstina estis tamen trankvila kaj milde pensis pri la morto en kunligo kun Kristo Mizerikorda. La 17-an de Septembro 1938 oni transportis la malsanan monaĥinon al Józefów en Łagiewniki. Hejme zorgis pri ŝi fratulino Amelia. Iam dum interparolo la flegantino diris: “Kiel bona estas Dio, ke la fratulino mortas tiom juna kun plena konscio; mi ankaŭ ŝate malsaniĝus per tuberkulozo kaj unu jaron post vi mortus”. La estonta sanktulino do promesis al ŝi propeti ĉe Sinjoro Jesuo la plenumon de tiu deziro. Vere precize unu jaron post la forpaso de Faŭstina mortis ankaŭ fratulino Amelia pro tuberkulozo de ostoj. Dek tagojn antaŭe monaĥino Kowalska antaŭanoncis la tempon de sia naskiĝo al eterneco. Tio okazis la 5-an de Oktobro 1938. Ŝi mortis trankvile en la Dia brakumo 33-jaraĝa post 13 jaroj de ordena

vivo.

La superulino de la monaĥinejo, Irena Krzyżanowska (*pron. Krjĵjanovska*) rememoras: “Fratulino Faŭstina post reveno el sanatorio trankvile kaj ekradiante spiritan belecon rakontis kun certeco ... ‘oni



starigos la feston de la Dia Mizerikordo ... mi sopiras nur plenumi la volon de Dio... mi sentas min bone kun la malsano... mi ĝojas ke mi mortas en ĉi tiu komunumo...’. Mallonge antaŭ la lastaj vivomomentoj ŝi menciis tute humile, ke Jesuo Kristo volas ŝin altiĝi al sankteco”.

En la lastaj monatoj de sia surtera pilgrimado sankta Faŭstina entute forgesis sin mem kaj ĉion oferis intence de la disvastigo de estimo al la Dia Mizerikordo, kiu fariĝis fundamenta elemento de ŝia vivo.

Kaj kio okazis post la morto de Faŭstina Kowalska?

En Vilniuso ekkreskis honorigo de la Dia Mizerikordo, do tial venadis al la ordeno demandoj pri la personeco de fratu-

lino Faŭstina. La ĝenerala superulino pro tio konatigis siajn monaĥinojn pri ŝiaj vivo kaj verko, pri la aperoj. Centro de la estimo fariĝis tial Józefów en la krakova kvartalo Łagiewniki, kie la sanktulino vivis, mortis kaj estis entombigita.

Ĉar la origina bildo de la Jesua Mizerikordo restis en Vilniuso, la akademia pentristo Hyla realigis novan bildon por la klostro kapelo: ĝiaj kopioj rapide disvastiĝis.

En 1959 la respondecata vatikana oficejo malpermesis honorigon de tiu bildo kaj ankaŭ la religiajn solenaĵojn faratajn laŭ instrukcioj de Faŭstina Kowalska. Sed malgraŭ tio ne ĉesis la estimon al la Dia Mizerikordo, kiun ne eblis tute sufoki.

La metropolita kurio de Krakovo komencis en 1965 informprocezon pri la vivo kaj agoj de fratulino Faŭstina. Pozitiva esploro rezultis per la atribuo de la titolo “Dia servantino” al ŝi. Unu jaron poste oni elterigis ŝian korpon de la tombejo kaj sepultis ĝin en masonitan tombon en kapelo de la ordeno en Łagiewniki-Józefów.

La 20-an de Septembro 1967 la tiama ĉefepiskopo de Krakovo, kardinalo Karol Wojtyła, finis la diocezan proceson kaj forsendis la koncernan aktaron al Romo. La 15-an de Aprilo 1978 la Kongregacio por la instruo de la kredo nuligis la malpermeson de 1959. Tiel realiĝis la profetaĵo de monaĥino Faŭstina Kowalska: post kompleta detruo venos nova prospero de la verko kaj ĝia heroldino fariĝos akceptata apostolino de la estimo al la Dia Mizerikordo.

Kion do aldoni? La adoro pere de la bildo de Jesuo kun la du edifaj radioj kaj per la kultado komponita de la vilniusa pastro Sopoćko trapenetris la tutan katolikan mondon.

La fratulino, kiun tiucele nia Sinjoro uzis kiel sian rimedon, estis beatproklamita la 18-an de Aprilo 1993 kaj la 30-an de Aprilo 2000 sanktproklamita.

Sankta Faŭstina, propetu por ni!

(La liturgia festo de sankta Faŭstina estas la 5-a de Oktobro.)

Jan KALNÝ, Ĉeĥio

Prelego de Stanisław Śmigielski dum la 66-a Kongreso de IKUE 2013 okazinta en Kalwaria Zebrzydowska, Pollando

LA FENOMENO DE RADIO MARYJA EN POLLANDO POR LA EVANGELIZADO DE KRISTANOJ



1. Enkonduko

“Ĉi tie Radio Maryja – la katolika voĉo en niaj hejmoj. Laŭdata estu Jesuo Kristo kaj Maria – ĉiam Virgulino”. Ekde la 8-a de Decembro 1991 ĉi-frazo sonas en la polaj hejmoj kaj koroj, kaj dank’ al satelitoj, ankaŭ ekster Pollando, en landoj de Eŭropo, Ameriko – Norda kaj Suda, ĉie, kie vivas samlandanoj – gepoloj; kie sonas la pola lingvo kaj la Katolika Eklezio servas al la homoj.

Radio Maryja estas do jam 21-jara kaj funkcias kun jura personeco, apartenanta al la Romkatolika Eklezio. La posedanto de la koncesio estas la Kongregacio de Fratoj



Pri Radio Maryja prelegas Stanisław Śmigielski

de la Plejsankta Redemptoro – la Redemptoristoj, rekte respondas al la Papo. Radio Maryja dissendas programon laŭ la koncesio validanta ĝis 2018. La programo kun karaktero socia-religia estas preparata de grupo da pastroj – fratoj kaj fratulinaj sub gvido de la direktoro d-ro Frato Tadeo Rydzik.

2. Ekesto de Radio Maryja

Komence de la 90-aj jaroj Frato Tadeo Rydzik decidis organizi radion laŭ la bib-

liaj vortoj: “Iru al la tuta mondo kaj prediku Evangelion al ĉiu kreaĵo”. Kiam oni demandis al li pri ĉi-decido, li respondis: “Mia ambicio estas prediki la Evangelion”. Fakte la ideo organizi katolikan radion ekaperis la 10-an de Februaro 1990 en la Sanktejo de la Dia Mizerikordo en Łagiewniki, do helpe de la perado de Fratulino Faustyna Kowalska, apogantino de la Mizerikorda Amo. Baldaŭ – en Marto de la sama jaro – la ideo ricevis la favoran apogon de la Redemptorista provincestro kaj en Junio la novestigita radio ricevis la unuajn permesojn por du malgrandaj elsendiloj, lokigitaj en la najbaraj urboj Toruń kaj Bydgoszcz.

La unua tago de la elsendoj estis la 8-a de Decembro 1991 – festo de la Senmakula Dipatrino. En 1993 RM ricevis la juran statuson de socia disaŭdigilo, laŭ decido de la ŝtata Landa Konsilantaro pri Radiofonio kaj Televido. Laŭ ĉi-decido, renovigita en 2004, RM rezignis je la pagitaj reklamanoncoj kaj la jara koncesia kotizo estis reduktita ĝis 20% kaj ĝi egaligis al 7,5 milionoj da zlotoj (ĉ. 1,88 milionoj da eŭroj). En 1993 RM komencis la elsendojn per satelito Eutelsat kaj unu jaron pli poste pere de satelito Galaxy 8 por Norda kaj Suda Ameriko, kie vivas kelkaj dekmilionoj da gepoloj.

La 2-an de Majo 2006 la prizorgon de RM komencis plenumi 8-persona programakonsilantaro (4 personojn nomumis la Episkoparo de Pollando kaj 4 la Ordeno de Redemptoristoj). La unua estro de la konsilantaro iĝis episkopo Waclaw Depo – la nuna episkopo de Częstochowa.

La 28-an de Marto 2007 en Varsovio estis realigita la unua Marŝado por la Vivo organizita fare de Radio Maryja.

La 5-an de Januaro 2008 Radio Maryja, kaj pli poste la apud ĝi aranĝitaj televidstacio Trwam kaj taggazeto Nasz Dziennik, estis honorigitaj per la ordeno Armeo pro Kristo, pro la “laŭdindaj kaj honorplenaj plenumado de animzorga misiado, donante la plej valorajn atestojn, kiuj estas la vero kaj la amo al Patrujo”, ordeno liverita de la Armea Episkopo Tadeo Płoski en la varsovia Armea Katedralo de la Pola Armeo.



3. Pri la programoj de Radio Maryja

La elementoj de la programo de RM estas: evangelizado, preĝado, meditado, religia muziko, soci-politika temaro.

En la monata programskemo estas la konstantaj eroj: nefinitaj interparoloj; aktualaĵoj de la tago; disaŭdigoj por: la geedzoj, la gejunuloj, la kamparanoj; konsilioj; la katekizado de la Katolika Eklezio; la instruoj de la Papoj kaj episkopoj; preĝado laŭ brevierio; kroneto al la Dia Mizerikordo; rozario.

Ĉiutage estas disaŭdigataj: la Sankta Meso je la 7-a horo, Klarmona Alvoko je la 21-a horo, reelsendo de la programoj de Radio Vatikana kaj, tagmeze, Anĝeluso kun la Papo, programeroj por infanoj, legado el libroj de kristanaj verkistoj, programoj de simfonia muziko.

Radio Maryja ligiĝas kun la ideoj naciaj kaj katolikaj kaj kun la tradicia pola katolika religio.

Nuntempe RM disaŭdigas per 123 disaŭdigiloj de ultrakurtaj ondoj en Pollando kaj per satelitoj.

En la programoj partoprenas eminentaj polaj sciencistoj – pastroj el la Katolika Universitato Lublina (KUL) kaj el aliaj altlernejoj, sed ankaŭ sciencistoj – profesoroj kaj doktoroj, eĉ nekredantoj, ĵurnalistoj kaj politikistoj.

4. La familio de Radio Maryja

Dum pli ol 20 jaroj da funkciado de Ra-

dio Maryja kreiĝis specifa socia movado: la Rondo de Radio Maryja (la Familio de RM). En ĝia strukturo estas: burooj kaj rondoj (ankaŭ junularaj) de la geamikoj de RM.

Ĉiujare, en la dua semajnfino de Julio, alvenas al Klara Monto la pilgrimo de la aŭskultantoj de RM: en 1993 estis pli ol 500.000 pilgrimantoj. Estas organizataj de la Rondo de RM pilgrimoj por junularo kaj por infanoj el la reto de la t.n. Etkortaj Rondetoj Rozariaj de Radio Maryja.

En la datreveno de la estiĝo de RM estas organizataj renkontoj kun la aŭskultantoj en la hejmlokoj de RM en Toruń kaj Bydgoszcz: oni prezentas la raporton de la Asembleo por Apogo de RM pri la agadoj de RM kaj TV Trwam dum la antaŭa jaro.

Radio Maryja estas financata nur de la monsubteno de la aŭskultantoj, kiuj sendas monon libervole: la Radio do ne dependas de la ŝtataj buĝeto kaj monhelpo.

Dum la pli ol dudekjara funkciado ekestis televidstacio Trwam, tagĵurnalo Nasz Dziennik, Fondaĵo Nasza Przyszłość (Nia Estonteco), Altlernejo de Kulturo Socia kaj Media.

Nuntempe estas konstruata preĝejo en Toruń, kiel danko voto por la papado de Johano Paŭlo la 2-a; oni ĝin finkonstruos por la tago de lia sanktproklamo.

5. La celoj de Radio Maryja

1. Radio Maryja estas la radio de la preĝo, de liturgio, de la servo al la Dia Vorto kaj Sankta Skribo, en kiuj ni kristanoj vidas nian ateston de la vero, la fonton de

nia anima forto. Radio Maryja servas al la evangelizado, por ke ni, aŭskultantoj, povu pliprofundigadi nian kristanecon.

2. La alia celo de RM estas akompanadi la Papojn en ilia servado kaj en iliaj apostolaj pilgrimoj tra la mondo.

3. RM akompanas ankaŭ la polan katolikan eklezion kaj la polan episkoparon.

4. RM estas tie, kie poloj laboras, preĝas, lernas, studas, kreas komunumojn.

Por atingi ĉi-celojn, RM ĉiulunde estas en diversa paroĥo por disaŭdigi kaj montri pere de TV Trwam la liturgion kaj la lokan katolikan kaj alikristanajn komunumojn.

Kaj ĉi-ĉio estas apogata de la Dipatrino – kies statuon portis el Germanio al Pollando la fondinto de RM Frato Tadeo Rydzyk, kaj kun kiu li komencis konstrui Radion Maryja laŭ la Vorto de l' Sinjoro "Ekloĝu inter ni" (Joh 1,14).

De du jaroj daŭras la batalo de RM kaj TV Trwam por ricevi lokon sur la diĝita platformo Multiplex 1 (*), kiun la Landa Konsilantaro de Radiofonio kaj Televido rifuzis doni. Por atingi ĉi tiun celon la aŭskultantaro de RM kaj spektantoj de TV Trwam kolektis preskaŭ 2,5 milionojn da subskriboj kaj organizis 173 marŝojn en la tuta Pollando. La loko estis promesita, sed la marŝoj plu daŭras.

6. La fenomeno de Radio Maryja

La vorto "fenomeno" laŭ la ĉiutaga parol-kompreno, signifas ion ekster la normo, ekster la normala esto, funkciado kaj agado. Ĉu oni povas paroli pri Radio Maryja kiel pri iuforma fenomeno?

Dank' al RM amasoj da katolikoj kontraŭstaris la radikalan maldekstrigon, integriĝis kaj eksentis, ke en la komunumo ili ne nur pli bone profundigas sian kredon, sed ili povas atingi pli multe en la socia dimensio, ankaŭ loka.

RM estas la plej forta ilo de la socia komunikado kaj jam ĉi-faktoro ne permezas, ke oni povu senpune misinformadi, manipulasi kaj trakti baptitajn homojn, la plimulto en Pollando, kiel "hontindan parton de la socio". RM estas nekutime grava

institucio de la polaj religia kaj socia vivoj, kiu rapide reagas je ĉio, per kio vivas la socio de la kredantoj. Danke al la formulo de RM (preĝoj, katekizado, telefonkontaktoj kun la aŭskultantoj) eblas rapida lernado, ekvido kaj priskribo de la sociaj kaj ekonomiaj okazintaĵoj, scipovo ekkomenci konkretajn agadojn. Homoj reciproke pliprofondiĝas en gravaj naciaj rekolektoj.

RM estas ekzemplo pri tio, ke, utiligante la modernajn teknologiojn kaj teknikojn, oni povas realigi gravan formadon de kredantoj kaj organizi interhoman komunikadon eĉ inter kontinentoj.

RM estas la radio de terglobo, ĉar ĝi ankaŭ atingas la aŭskultantojn en aliaj mondpartoj. Evangelio estas, oni povas diri, globala kaj povas esti aŭskultata pere de interreto kaj satelitoj en la tuta mondo.

RM aktivigas ankaŭ laikaron. Tie, kie ĝi estas aŭskultata, la aŭskultantoj ofte estas tre aktivaj en la paroĥaj komunumoj.

La aŭskultantoj de RM preĝas kaj aktive defendas la homan vivon ekde la komenco ĝis la natura morto, anoncanta la Evangelion de la Vivo, precipe nuntempe, kiam la "civilizacio de morto" tiel grand-skale aktivas.

RM subtenas la homajn rajtojn, la rajtojn de la familio kaj de la nacio, la rajton de la humila vivo en la vero kaj la amo. Ĝi mobilizas al la digna vivo kaj defendas malfortulojn kaj flankenigitojn.

RM helpas defendi la malfacile akiritan donacon de la libereco en Pollando kaj utiligi ĉi-donacon en propra kaj socia dimensioj.

RM estas ankaŭ "signo de kontraŭeco" kaj eble pro tio la "potenculoj de la mondo" difinas la aŭskultantojn "mohajraj beretoj", malmodernaj homoj. Eble pro tio RM havas ne nur en Pollando tiomajn malamikojn!

Stanisław ŚMIGIELSKI, Pollando

(teksto resumita de la Redakcio)

(*) "Multiplex" (nova E-vorto: multiplekso) estas elsendomaniero de la diĝita televida signalo, pere de kiu pluraj televidaj, radiaj kaj datenaj kanaloj estas transsenditaj per la sama grupo de frekvencoj dank' al uzo de kunpremiĝo kaj kombino de signaloj (ndlr).

KIA ESTU BONA LITURGIO? KIEL ONI PLEJ BONE GLORAS DION?

En la unua parto oni traktis pri la ŝajne kontraŭaj vortparoj: konservemo/progresemo, kaj racio/sento. Estas alia paro da ŝajne kontraŭantaj ecoj, kiuj havas

DUA PARTO

Ĉu liturgio prefere estu kvietiga, profundiga, aŭ ĉu ĝi estu gaja kaj viviga, eble eĉ ekscita?

Kiel homoj en kaj pere de liturgio povas proksimiĝi al Dio, kiel liturgio povas helpi, ke la partoprenantoj spertas ion pri Dio, aŭ spertas Dion? Kiel Dio en liturgio povas montriĝi kiel la vivanta kaj ĉeestanta Dio?



Preleganta Stefan Lepping

Mi denove volas citi el la Biblio, el 1Reĝ 19,11-13; temas pri la apero de Dio al la profeto Elija sur la monto Ĥoreb. “Kaj jen la Eternulo preteriras, kaj granda kaj forta vento disŝiras montojn kaj disrompas rokojn antaŭ la Eternulo. Sed ne en la vento estis la Eternulo. Post la vento estis tertremo, sed ne en la tertremo estis la Eternulo. Post la tertremo estis fajro, sed ne en la fajro estis la Eternulo. Post la fajro aŭdiĝis blovado de delikata venteto. Kiam Elija tion ekaŭdis, li kovris sian vizaĝon per sia

mantelo, kaj eliris kaj stariĝis ĉe la enirejo de la kaverno”.

Tio signifas: Ventego, tertremo, fajro povas esti antaŭsignoj de Dio, kiu venas; sed ne en tiuj troviĝas la Sinjoro, sed en milda, delikata venteto, do en la kvieto. Ĉu tio signifas, ke en liturgio oni nepre donu preferon al kvieteco, trankvileco, eble eĉ momentoj de komuna silentado, por ke en ĉi tio sin revelaci la vivanta Dio?

Jes kaj ne. Unue, ĉar eble ne estis hazardo, ke ventego, tertremo, fajro (do simboloj por forta, laŭta, verva laŭdado) antaŭiris la Sinjoron. Dio estas potenca, majesta Dio, kaj Lia majesteco fariĝu spertebla en bona liturgio, kiel ĝi fariĝis spertebla en ventego, tertremo kaj fajro antaŭ la profeto Elija (kiu cetere ĉi-momente estis en profunda krizo de sia fido al Dio). Malforta, senpotenca aŭ nespertebla Dio ne utilas al iu ajn. Tio ja ankaŭ estis la terura krizo de la apostoloj dum kaj post la krucumiĝo de Jesuo: se Dio eĉ ne savas sian propran Filon de la morto, la tuta antaŭa triumfado estis vanta kaj trompa! Tamen, estas tre necese por kristano, kompreni, ke tiu maniero, en kiu Dio kelkfoje agas: venteto, mildeco, nevenĝemo, toleremo ĝis ŝajna neado de si mem! (la morto de sia Filo), en vero signifas superecon. Dio estas super ĉiu naturo. Li ne bezonas fortojn de la naturo, por revelacii sin mem. Eĉ oni povus miskompreni lin kaj troe identigi la ĉiopovan Dion kun la eksteraj povoj de ventego, tertremo, fajro, kiuj estas nuraj kreaĵoj, kiuj devas servi al

Li. Aŭ oni troe povus fidi kaj celi al natura, korpa forteco de homo, eĉ se temus pri la homa, korpa forteco de la Filo de Dio. Ne per sia natura forto kaj boneco, Jesuo evidentiĝas kiel Filo de Dio, sed en sia kompleta submetiĝo al la Patro, eĉ ĝis la morto kaj trans la morto.

Tiuj teologiaj pensoj havas signifon ankaŭ por la demando, kia estu liturgio: estas necese, ke oni ne unuavice celu fari pompan, majestan, viglan ktp liturgion, por plaĉi al homoj. Tio eventuale estus ankoraŭ ne afero de la Regno de la ĉielo, sed de ĉi tiu mondo! Per tio oni eble povas helpi al homoj pasigi belan tempon, same kiel oni irus al teatraĵo aŭ koncerto; eble tio ĉi eĉ povus esti iu bona esotera memsperto, sed eble oni gloras sin mem, siajn artajn kantojn aŭ preĝojn ktp.



Se liturgio estas gaja, viviga, ekscita, tio povas esti bona kaj agrabla por ni homoj. Se io estas vere bona por ni homoj, ankaŭ Dio estas kontenta. Kaj se ni havas tiun ĝojon kaj ni konscias, ke ĝi venas de Dio, eble ankaŭ ni havas la pretecon, poste iri pli profunden: ne nur ami la emociion, sed la Donanton de la emocio. Ekzistas, nome, iu danĝero, kiun oni devas eviti: ke ni restu ĉe nia bela sento, kaj ne transiru al Dio. Estas danĝero, ke ni festu pli nin mem, ol Dion! Tio estus karikaturo de vera liturgio, kaj ĝi nek vere estus bona por ni mem, nek ĝi povus plaĉi al Dio.

Estas grava kondiĉo por bona liturgio, ke ne ni mem faras ĝin, sed ke ni, ĉu pastro, legisto, ĉefpreĝanto, muzikisto, aŭ “nur” or-

dinara ĉeestanto, submetiĝas, transdoniĝas al Dio, al la Eternulo dirus la malnova testamento – aŭ: al la Patro, Filo kaj Sankta Spirito – laŭ la nova testamento. La respekto, eble eĉ la submetiĝo, al tradiciaj, do, al elprovitaj formoj de liturgio, povas esti valora. En tio evidentiĝas, ke vere ne ni faras, planas, produktas liturgion, laŭ niaj pensoj kaj bontrovoj, sed ke ni aliĝas al supernatura kaj supertempa glorado de Dio. La unuopa persona vidpunkto malaperas malantaŭ la pli granda fenomeno home-Dia, kio estas la eklezio! Kelkaj elementoj de la liturgio, ekzemple la “Sankta”-himno, ja devenas de neniuj homoj. Sed el Dia revelacio (en ĉi tiu kazo temas pri rigardo de la profeto Jesaja al la ĉielo, en kiu li vidis la Sinjoron sur sia trono kaj la serafanĝelojn laŭdegantajn antaŭ Li). Ĝenerale, multaj elementoj el tradiciaj liturgioj venas el la Sankta Skribo, kaj tiel ili baziĝas ne nur sur iuj homaj pensoj, sed sur la eterna vorto de Dio, kiu eniris – kaj en la liturgio nove eniras – nian mondon kaj tempon. La vorto de Dio havas sencon ne nur en la historia momento, kiam ĝi estis revelaciita, sed ĝi venas el la eterno kaj validas por ĉiuj tempoj (eĉ se laŭnuance ĝia kompreno povas varii en la unuopaj epokoj).

Publika kaj komuna glorado de Dio, do la liturgio, devus respekti, ke homoj estas malsamaj. Ĝi nek nur respektu la emojn de gajemaj homoj, nek nur la profundemon de kontemplemaj homoj. Ĝi devus esti iom ĝenerala kaj ĝenerale akceptebla, ne ekstrema en unu aŭ alia direkto. Ĝi devus havi iun ordon kaj regulecon, por ke oni sciu, kio kiam okazas.

Sed krom publikaj liturgioj, mi pensas, ke oni devus flegi ankaŭ pli malstriktajn, pli personajn formojn de komuna preĝado kaj kantado, en grupoj. Tio eĉ ne nepre devas okazi en la oficiala preĝejo. Mi mem en tiel nomata hejma rondo de kredantoj estis tiel forte tuŝita per la sincera kaj persona preĝmaniero de la anoj de tiu rondo, ke la realeco de Jesuo fariĝis al mi evidenta, kaj mi komprenis neceson, vere fondi sur Lin

mian vivon. Estas interese, ke Jesuo diras: “kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili” (Mat 18,20). Kvankam iu malgranda rondo neniam devas fariĝi iel sekta aparta grupeto, sed devas resti viva parto de la tuta eklezio, aliflanke la tuta eklezio ne estas vere viva, se en pli malgrandaj eroj la kredo ne vere vivas. Ambaŭ bezonas unu la alian: la unuopuloj, aŭ grupetoj, la tuta eklezio (oni ja ne povas havi sian propran Jesuon por si mem!), kaj la tuta eklezio bezonas siajn vivajn ĉelojn, ekzemple, sed ne nur, la familioj.

Nun mi volas en la fino doni iun super-rigardon pri la ĉefaj manieroj de liturgioj kaj kantadoj en la diversaj konfesioj, laŭ mia kono (verŝajne tiu mia kono estas nur laŭparta). Ĝenerale, certaj elementoj estas komunaj al liturgioj de diversaj konfesioj, ekz: preparo, malfermo, pentesprimo, legaĵoj el la Biblio, prediko, kredkonfeso, porpetoj, eventuale sankta manĝo, patro nia,... Ofte estas fiksjaj aŭ libere elektitaj kantoj kaj preĝoj inter la elementoj.

1) La plej malnovaj liturgioj estas en la diversaj ortodoksaj aŭ orientaj eklezioj. Grandparte ili devenas el la fruaj jarcentoj post Kristo; ilia evoluo estis pli malpli finita en la unua jarmilo. Ili uzas diversajn lingvojn, sed tamen en parte ege malnova formo: la aramean, la malnov-grekan, la malnov-slavan, la armenan, la koptan (kiu estas malnov-egipta), ktp. Ili daŭras ofte plurajn horojn, kaj ili ankaŭ donas impresojn al la okuloj (pompaj vestoj, ikonoj, kandeloj), al flarsenso (incenso), kaj al korpamano preĝi (procesioj, krucosignoj, kliniĝoj). Ili estas preskaŭ nur kantataj, parte de pastro kaj diakono, parte de koruso, kiu anstataŭigas kaj reprezentas la popolon, por kiu la laŭritaj kantoj ĝenerale estus tro malfacilaj. La popolo aliĝas al la liturgio, aŭskultante, farante krucosignojn, lumigante kandelojn, ktp. Mankas benkoj, kaj ne estas malpermesite dum la liturgio iom iri de loko al loko, aŭ de ikono al ikono (kiu, laŭ ilia kompreno, estas kvazaŭ fenestroj al la eterna mondo!). Temas pri iu

ĉeestado, restado en sankta spaco kaj tempo, kie okazas la ĉiela liturgio. Ĉeestante tiun ĉielan liturgion, kiu estas imagata kiel teren-veno de la ĉielo, oni sanktigas sin kaj jam kutimiĝas al la ĉielo, kaj tiel, post la fino de la liturgio, oni, ŝanĝitaj, ree iras al sia laboro aŭ ĉiutaga vivo.

2) La liturgio de la okcidenta rom-katolika eklezio ankaŭ estis malnova, sed en la dua Vatikana Koncilio okazis sufiĉe fortaj ŝanĝoj. Ekde la jaro 2007, la tradicia kaj la reformita liturgio de 1970 denove estas oficiale samrajtaj, kvankam la reformita restas la ordinara versio, kaj la tradicia la eksterordinara versio de la unu roma rito. La tradicia formo de la romkatolika liturgio estas la tre malnova gregoriana kantmaniero.

En la hodiaŭa reformita formo preskaŭ ĉiaj kantoj estas permesitaj, laŭ la bontrovo de la respondeculoj de la liturgio. Tamen devas/devus esti respektataj la liturgiaj tekstoj, ekzemple de la Sankta-Himno, la Gloro-himno, la Kredkonfeso, la Ŝafido de Dio. La lingvo de la reformita formo estas la plej multaj naciaj aŭ gepatraj lingvoj (cetero ankaŭ Esperanto estas inter la aprobitaj lingvoj!), la lingvo de la tradicia formo estas nur la latina (do la antikva roma) por la tuta mondo.

Oni povas kontesti, ke nekompreneblaj liturgiaj lingvoj estas malbonaj. Tamen, en la liturgio, la legaĵoj kaj ĉefe la prediko estas en la gepatraj lingvoj. Koncerne la preĝon: la moderna homo tre alte taksas la intelekton en la preĝo. Tamen por la antikvuloj ne tiel gravis la kompreno, sed la leviĝo al Dio de la animo. Jam la judoj en la tempo de Jesuo ne preĝis la oficialajn preĝojn en sia ĉiutaga lingvo, la aramea, sed en la antikva hebrea! Kaj la nobleco kaj beleco de lingvo eble pli povas helpi tiun leviĝon al Dio, ol tro plata ĉiutaga lingvaĵo. Tamen, eble ne temas pri aŭ, aŭ, sed pri kaj, kaj: Ankaŭ Jesuo kredeble preĝis hebree en la liturgio, sed en sia persona preĝo aramee (Abbà estas aramea vorto!, hebree: abi).

3) De la okcidenta katolika eklezio evoluis la diversaj ritoj de la reformacio.

Malnova luterana liturgio ankoraŭ sufiĉe similas laŭ strukturo al romkatolika meso. La kalvinana liturgio estas pli libera, estas sinsekvo de kantoj kaj preĝoj. Kutime la kantado estas ekde la tempo de la reformaciintoj en nacia lingvo, por ke ĉiuj komprenu. Sed multaj ne scias, ke en iuj festaj liturgioj luteranoj ankoraŭ longe uzis la latinan lingvon! Kelkaj kantoj estis tradiciaj himnoj, tradukitaj el la latina lingvo. Aliaj estis nove verkitaj kiuj popularigis reformacian teologion. En kalvinismo, tre gravis ankaŭ rimitaj kaj muzikigitaj psal-



mokantoj. Mi volas rakonti du interesajn anekdotojn pri reformacio kaj muziko. Unu: iu diris, ke Martin Luther per siaj kantoj forlogis pli da animoj al la reformacio, ol per sia prediko... La dua estas iom hontiga por ni hodiaŭaj katolikoj, specife por ekleziaj muzikistoj: oni diris, ke oni povas ekkoni la reformaciemulojn laŭ ilia maniero kanti. Nun okazis, ke iu urbestro sendis spionon en la preĝejojn de sia urbo, por vidi, ĉu la homoj ankoraŭ estas en katolika kredo, do, kiom el ili kantis, kaj kiom preĝis silente. Sed la spiono revenis kaj diris: Sinjoro, ili kantas ĉiuj! Kaj la urbestro diris: Ve, tiam ĉio estas perdita...

3) La granda sukceso de la reformacio pere de la muziko por la popolo montras, ke la homoj volis esprimi sian kredon mem, inter alie per la muziko, kaj ne nur pasive elteni iun liturgion. En Germanio tiu emo de la popolo je kantado baldaŭ influis ankaŭ la katolikan eklezion tiel, ke ĝi ankaŭ pli riĉe produktis kantojn por la popolo. Tial la katolika eklezio en Germanio havas sufiĉe grandan stokon da tradiciaj

kantoj tra la jarcentoj.

4) En la tiel nomitaj liberaj eklezioj, ekz. Pentekostanoj, la liturgio kutime estas pli malstrikta. Oni komencas per aro da kantoj, por malfermi la asembleon al la Sankta Spirito kaj unuigi ĝin en la laŭdo de Dio. Poste estas legaĵo kaj sufiĉe longa prediko, poste anoncoj, preĝoj liberaj, ankaŭ de unuopuloj el la asembleo, Eventuale okazas sankta manĝo, povas okazi malgrandaj teatraĵoj, korusa muziko, filmetoj, atestoj, ktp. Inter la unuopaj eroj kutime estas kantoj.

La muziko ekzemple de pentekostaj kantoj estas sufiĉe modernstila, ofte akompanata ankaŭ per modernaj muzikiloj. Al ili estas grave montri, ke Kristanismo ne estas io malmoderna, eksmoda. La kantoj ofte havas malmulte da teksto, rektan alparoladon de Dio kaj Jesuo, kaj la melodioj kaj harmonioj estas sentoplenaj.

Per mia prelego, mi ne volis partiece diri, tiu liturgio estas bona, tiu malbona; tiu maniero estas ĝusta, tiu malĝusta. Mi volis fari kelkajn ĝeneralajn pripensojn pri liturgio kaj preĝado kaj ĝia teologia bazo. Se mi donis por tio kriteriojn por pli bona liturgio, mia celo estus atingita.

Tre plaĉas al mi la eldiro, kiun mi trovis en iu kantlibro: “Ni volas kanti novajn kantojn, kaj novmaniere kanti malnovajn kantojn. Ĉar la Spirito ĉiam estas nova”.

Mi pensas ke la homoj estas malsamaj, la tradicioj estas malsamaj, la landoj estas malsamaj. Krom sia propra tradicio, estas bone koni kaj respekti ankaŭ tiujn de aliaj kristanoj. Eble eĉ enestas io, kio povas riĉigi la propran tradicion, la propran kristanan vivon, la propran vidpunkton. Ĉio havas sian bonon; ĉio, sian malavantaĝon. Mi persone ŝatas ĉian sinceran laŭdadon de Dio, kaj mi pensas, ke estus bone por ĉiaj kristanoj, atenti la vortojn el 1 Tesalonikanoj 5, v.16-21: “*Ĝoju ĉiam; preĝu senĉese, pri ĉio donu dankon; ĉar tia estas la volo de Dio en Kristo Jesuo pri vi. Ne estingu la Spiriton; ne malestimu profetaĵojn; (kaj ĉefe:) elprovu ĉion, tenu firme tion, kio estas bona*”.

Stefan LEPPING, Germanio

“Providenca iniciato” por “remalkovri la belecon de la kredoirado”: tiel parolis Papo Francisko la 24-an de Novembro dum la Meso por la fermo de la Jaro de Kredo en placo sankta Petro, en la liturgia soleno de Kristo Reĝo. Preskaŭ 60.000 estis la fideluloj, kiuj alvenis por partopreni en la evento, kiu kulminis per la livero, fare de la Papo, al diversaj reprezentantoj de la Eklezio kaj de la socio de ekzempleroj de la apostola Instigo *Evangelii gaudium* (La ĝojo de la Evangelio).

KONKLUDO DE LA JARO DE LA KREDO

La unua “penso plena de amemo kaj dankemo” de Francisko estis por Benedikto la 16, kiu, la 11-an de Oktobro 2012 (v. EK 10-12/2012, paĝo 66), inaŭguris la Jaron de la Kredo, 50 jarojn post la dua vatikana Koncilio: “Per tiu providenca iniciato – substrekis Francisko – li proponis al ni la eblecon remalkovri la belecon de tiu kredoirado, kiu komenciĝis en la tago de nia bapto, kiu igis nin filoj de Dio kaj fratoj en la Eklezio”.

Tuj poste, la Papo salutis la Patriarkojn kaj la superajn ĉefepiskopojn de la katolikaj orientaj Eklezioj, kiuj ĉeestis dum la Meso: “La interŝanĝo de paco, kiun mi faros kun vi, volas antaŭ ĉio esprimi la dankemon de la Episkopo de Romo por tiuj komunumoj, kiuj kredkonfesis la nomon de Kristo per modela fideleco, ofte je altega kosto”.

Kaj pere de ili, la Papo sin adresis al ĉiuj fideluloj en Oriento: “... per ĉi tiu gesto mi celas atingi ĉiujn kristanojn, kiuj vivas en Sankta Lando, en Sirio kaj en la tuta Oriento, kun la celo havigi al ĉiuj la donacon de la paco kaj de la konkordo”.

Komentante la bibliajn legaĵojn proponitajn de la Liturgio (2Sam 5,1-3; Kol 1,12-20; Mar 11,9-10), Francisko evidentigis “la centrecon de Kristo: Kristo, centro de la kreaĵaro; Kristo, centro de la popolo; Kristo, centro de la historio”: “Kiam oni perdas ĉi tiun centron, ĉar oni anstataŭigas Lin per io alia, fontas nur damaĝoj, por la medio ĉirkaŭ ni kaj por la homo mem”.

Al Li, fakte – memorigis la Papo – “ni povas diri la ĝojojn kaj esperojn, la malfeliĉojn kaj la angorojn, kiuj interplektiĝas kun nia vivo”: “Kiam Jesuo estas je la centro, ankaŭ la pli mallumaj momentoj de nia vivo heliĝas, kaj Li donas al ni esperon, kiel okazis al la bona rabisto de la hodiaŭa Evangelio”. Parolante al li, “Jesuo diras nur vortojn de pardono, ne de kondamno”, “kiam la homo trovas la kuraĝon peti ĉi tiun pardonon” Jesuo “neniam faligas” lian peton.

Kaj antaŭ la formulo por la fermo de la Jaro de la Kredo, Francisko finis jene: “Ĉiu el ni havas sian historion; ĉiu el ni, ankaŭ, faras siajn erarojn, siajn pekojn, havas siajn feliĉajn momentojn kaj siajn mallumajn momentojn. Bonon faros al ni, en ĉi tiu tago, pensi al nia historio kaj rigardi Jesuon kaj el nia koro rediradi al Li, sed per la koro, silente, ĉiu el ni: ‘Memoru min, Sinjoro, nun, ke Vi estas en via Regno! Jesuo, memoru min, ĉar mi volas fariĝi bona, sed mi ne havas la forton, mi ne sukcesas: mi estas pekulo, mi estas pekulo! Sed memoru min, Jesuo: Vi povas memori min, ĉar Vi estas je la centro, Vi estas en via Regno!’ . Kiel bele!”.

Antaŭ la posta tagmeza trapreĝo de la Anĝeluso, la Papo deziris liveri ekzempleron de sia apostola Instigo *Evangelii gaudium* al 36 reprezentantoj de la Eklezio kaj de la socio el 18 landoj de ĉiuj kontinentoj. Inter ili estis episkopo, pastro kaj diakono, kelkaj gereĝiuloj, konfirmaciitoj, seminariano, noviculino, unu tuta familio, katekistoj, blindulo – kiu ricevis kompakt-diskon – kaj plie: kelkaj gejunuloj, la delegitoj de frataroj kaj movadoj. Fine, por la mondo de la kulturo: skulptisto, pentristino kaj du ĵurnalistoj.

NIA SINJORINO DE LA ESPERO

De 100 jaroj Patronino de la katolikaj esperantistoj



*La pentraĵo de pastro
Arcangelo Intreccialagli*

Inter la patronoj de la katolikaj esperantistoj estas Nia Sinjorino de la Espero. Ĉi-jare soleniĝas la 100a datreveno ekde kiam la katolikaj samideanoj elektis Ŝin kiel sian unuan patroninon. Kiamaniere kaj kial okazis tiu elekto?

La respondon oni trovas en EK n-ro de Decembro 1913, paĝo 337: “Oficialaj komunikoj: En la oficiala raporto de “Nia Kvara” [la IKUE-Kongreso okazinta en 1913, ndlr] estas forgesita, ke la Roma Kongreso laŭ propono de P-ro Planas (Hisp.) akceptis kiel patroninon de IKUE “Nian Sinjorino de l’ Espero”. Sub Ŝia potenca protektado IKUE kresku kaj floru!”. Pastro Josef Planas mem skribis: “Sepan de septembro (4-a laborkunsido)... Ankaŭ mi havis grandan honoron je la nomo de la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj proponi, kaj la kongreso akceptis, ke la IKUE-anoj en la tuta mondo honoru kiel Patroninon kaj Protektantinon la sanktan Virgulinon de l’ Espero” (Kataluna Katoliko, jaro III, Novembro 1913, n-ro 11 (26), p. 5)”.

La informo aperis ankaŭ en la numero de la 12-a de Septembro de la itala ĵurnalo “Corriere d’Italia” kaj en tiu de la posta tago de la vatikana “L’Osservatore Romano”. La artikolo sub la titolo “La fermo de la Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj” finiĝis jene: “Post kelkaj vortoj de la IKUE-prezidanto Parker estis aprobata la propono de la hispana abato Planas elekti kiel Patroninon de IKUE la Virgulinon sub la malnova nomo Nia Sinjorino de la Espero”.

P. Jozefo Planas (1816-1929) vivadis en vilaĝo Barbarà del Vallés (proksime de Sabadell, en Katalunio). Ke la proponon faris loĝanto de tiu regiono estas kompreneble, ĉar la Sankta Virgolino sub la titolo de la “Espero” estas tre kultata tie kaj en la tuta hispana duoninsulo, verŝajne pro la fakto, ke la antifono “Salve, Regina”, laŭ unu el la tradicioj, ŝajnas esti verkita de episkopo el Compostella en la 13-a jarcento.

MESOJ

En Castellaro (Sanremo) okazis de la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto la 80-a kongreso de Itala E-federacio kun la partopreno de 250 esperantistoj el trideko da landoj. Dum la kongreso, en la paroĥejo de sankta Petro *In Vinculis* estis celebrata Meso en E-o fare de pastro Luigi Alfano, kun la partopreno de kvardeko da esperantistoj.

Meso en Esperanto estis celebrata la 20-an de Oktobro en Padovo (Italio) okaze de la publika solenado de la 100-a datreveno de la fondo de la loka E-grupo. La Meson celebris pastro Pierluigi Svaldi.

Ni funebras kaj kondolencas

FRANCISZKA BARDECKA



La 24-an de Aŭgusto en la aĝo de 90 jaroj, naskinte la 6-an de Mar-
to 1923, mortis en Krakovo (Pollando) Franciszka Bardecka, dumviva
membrino de IKUE kaj dum multaj jaroj ĝia landa reprezentantino en
Pollando. En sia loĝloko ŝi estis konata kiel aktiva katolika agantino
kaj esperantistino laboranta en sia paroĥejo de sankta Stefano, kiel gv-
dantino de misia grupo. De 1964 ŝi okupiĝis pri Esperanto kaj ekde
1968 ŝi zorgis pri katolikaj, esperantaj aranĝoj en la krakova medio.

Ŝi organizis esperantajn ĉiumonatajn Diservojn en diversaj preĝejoj. Precipe ŝi zorgis pri
ĉiujaraj pilgrimadoj al la pilgrimloko de la Mizerikorda Jesuo en Krakovo-Lagiewniki,
en kiuj tre volonte partoprenis eksterkrakovaj esperantistoj. Franciszka Bardecka multe
kunlaboris kun esperantistaj animzorgantoj, pastroj Franciszek Tokarz, Józef Zielonka kaj
patro Stanisław Płachta. En unu el oblataj renkontoj, en la 90-aj jaroj de la 20a jc., parto-
prenis, invitita de ŝi, la nuna ĉefepiskopo de Varsovio Kazimierz Nycz, kiu fervore kantis
esperantajn kantojn. Ofte ŝi reprezentis Pollandon dum internaciaj aranĝoj de IKUE. Dum
la renkontoj de la krakovaj katolikaj esperantistoj ŝi informis pri sia pormisia agado kaj
montradis lumbildojn pri misiista laboro en foraj, ekstereŭropaj landoj. Ankaŭ ŝi intense
informis pri la agado de IKUE. Zorgeme ŝi kolektis katolikajn esperantajn librojn kaj
precipe plenajn jarkolektojn de esperantaj revuoj kaj gazetoj, kiujn oni disponigis al vo-
lontuloj. Franciszka Bardecka ankaŭ partoprenis en la laboroj de kelkaj ĝeneralaj esperan-
taj organizaĵoj kaj kunlaboris kun ili, ekz. por la Krakovaj Esperantaj Tagoj ŝi aranĝis la
celebron de Meso en la preĝejo de sankta Norberto. Dum la jaroj de la t.n. “fera kurteno” ŝi
ricevadis el la Centra Oficejo de IKUE ĉiujn ekzemplerojn de EK por la gefratoj loĝantaj
en orienteŭropaj landoj, kie la ricevo de religia materialo estis riskoplena. Ĉar en tiuj
landoj (ekz.: la tiama Ĉeĥoslovakio) la korespondaĵoj el Pollando ne estis submetitaj je
strikta kontrolo (ĉar evidente oni fidis je “frata, komunista lando”) Franciszka, per intensa
laboro, transsendis la revunumerojn, dividante la paĝojn en plurajn leterojn, por ke la
pezo ne estigu scivolemon de la poŝtaj aŭtoritatoj pri ilia enhavo. La samon ŝi faris por
la bultenoj de Radio Vatikana kaj aliaj eldonaĵoj. Ĉiujare, okaze de Kristnasko, ŝiaj kore-
spondamikoj ricevis akurate ŝiajn bondezirajn leterojn, en kiujn ŝi ĉiam aldonis la tradi-
cian polan “opłatek”, malgranda blanka oblato kun la simboloj de Kristnasko. Kvankam
jam tre malforta, tamen ŝi tre interesiĝis pri la ĉi-jara 66-a Kongreso de IKUE en Kalwaria
Zebrzydowska petante telefonajn informojn pri ĉiuj aranĝoj. Ŝia entombigo okazis la 29-
an de Aŭgusto je la horo 12.20 en tombejo Rakowicki en Krakovo: dum la rito parto-
prenis multaj personoj, inter kiuj estis kvin pastroj: eksparoĥestro Andrzej Waksmański,
paroĥestro Leszek Garstka, pastro Józef Zielonka kaj du misiistoj kun kiuj ŝi kunlaboris.

En la rememoro de ĉiuj IKUE-anoj kaj esperantistoj, kiuj konis ŝin, Franciszka Bar-
decka restos kiel fervora katolikino kaj aktiva agantino de la katolika esperanta movado,
sed ankaŭ kiel kara, amema, humila fratino. En mi la bedaŭron pro ŝia forpaso plikreskigas
la ĉagreno pro la fakto, ke ne eblis al mi renkonti ŝin okaze de la ĉi-jara IKUE-kongreso,
kiel ŝi tre deziris. Bonvolu pardoni min, Franciszka. (*Red. - ankaŭ surbaze de artikolo
aperinta en “Apudvistula Bulteno” de la Krakova Societo Esperanto.*)

LUCIA MIANO

La 5-an de Septembro forpasis 88-jaraĝa en Sanremo (Italio) la delongtempa itala
IKUE-anino Lucia Miano. Ŝi havis tre malavaran animon: dum la lastaj jaroj ŝi sendis
multajn mondonacojn favore al la afrikaj forgesitaj georfoj.

La Sinjoro akceptu ĉi tiujn niajn fratinojn en sian domon. Ni rememoru ilin en niaj preĝoj.